AKTUALA ESPERANTO - INFORMILO MONATA DE LA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

N° 4 / 2011 Aprilo

Aktuala ESPERANTO

36-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de **Esperantista Brusela Grupo**, socieo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "*reĝa*" socieo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 ; Eltiro 200 ekzemploroj.

Informoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeo.net

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

Paĝo 2 - Kotiz-tabelo 2011; Kapriol' koncertas ; Sveda lingva konflikto
Paĝo 3 - Poemis Garcia, Bronŝtejn ; Tradukis McLauchlin, Hasbun
Paĝo 4 - E-staĝo en Elzasujo; Promenadoj en Kortrijk
Paĝo 5 - Paska dato kaj tradicio; Semajna origino ; Kristana erao
Paĝo 9 - Verdesperanto; Senperforto; Feng Ŝui; Biciklado ;Planedoj
Paĝo 13 - Ma Young-tae el Koreujo instigas al maldikigo de vortaroj

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Marto 2011

02 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
09 Kunveno (Karnavalo marde la 8a de Marto 2011)
16 Semajna kunveno
23 Semajna kunveno
30 Semajna kunveno

Aprilo 2011

06 Bernard-Regis Larue prelegas pri Astronomio
13 Semajna kunveno
20 Semajna kunveno (Pasko Katolika kaj Ortodoksa dimanĉe 24a de Aprilo 2011)
27 Semajna kunveno

Majo 2011

04 Semajna kunveno
11 Semajna kunveno
18 Semajna kunveno
25 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

KOTIZ-TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivo de la Grupo
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Socieo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al konto 000-0 123 048-52

KAPRIOL' 15-an DE APRILO

Jam anoncita donaco de Esperantista Brusela Grupo, vendrede la 15an de aprilo 2011, en salono de la *'Centre Communautaire du Maalbeek', avenue d'Auderghem 90* (Etterbeek 1040 Bruselo), koncerto senpaga kaj malfermita al ĉiuj muzik-ŝatantoj, de balfolka danciganta muzikgrupo Kapriol', popolmuzika bando de Frislando.

Françoise Pellegrin

LINGVA KONFLIKTO EN SVEDA ESPERANTUJO

Ĉu oni parolu Esperanton en strategia renkontiĝo pri la estonteco de la landa asocio de UEA? Aŭ ĉu oni parolu nur nacilingve "por ke ĉiuj komprenu"? Tiu estis unu el la kernaj demandoj, kiuj kondukis al freŝa skismo en la Esperanto-movado de Svedujo. Demisiis la reprezentanto de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo en la estraro de Sveda Esperanto-Federacio. Aliaj reprezentantoj de la pli juna generacio simile esprimis sian plenan seniluziiĝon pri la "*maljunula*" movado, dum pli aĝa aktivulo proponis solvi la konflikton per malfondo de la junulara sekcio.

Laŭ Libera Folio

POEMARO:

23 SEPTEMBRO 2010

Venas aŭtuno. Foriras somero
plorante punojn el luma forkuro
kaj, inter nuboj el nigra veluro,
komenciĝas la aŭtuna vetero.

Foriras somero al la mistero
de horoj sen lumo; al l´loko-spuro
zodiaka de l' ĉiela futuro
kie ĉio ĉi estas efemero.

Funebraj krepoj de melankolia
ĉielo, en ĉi krepuska aŭroro
farigas al ni orfoj, sen radia

suno; kun vi, foriras la koloro
kaj la gajeco, restante nur via
kaj mia somera velkinta floro.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

EN LA MEZO DE SEPTEMBRO

En la mezo de septembro,
antaŭ pluv', venonta poste,
trankviliĝas ir' de l' tempo,
pace ekas la ripoz' de

bedo da asteroj buntaj,
nigre brila merlareto,
plaŭdoj fiŝaj, zumoj burdaj…
Eĉ du nadloj en diskreto

taktan movon bremsis trene,
haltis post tiktaka febro,
ripozantaj kun naiv'.

Pigre, pene, plenserene
en la mezo de septembro
malrapide fluas viv'.

Mikaelo Bronŝtejn, Tiĥvin, Rusujo, 16.09.2004

MNEMONIKO

Tridek tagoj en septembro,
april', junio, kaj novembro;
Ĉiuj kromaj de la kalendar'
Tridek-unu havas, krom februar',
Kun dudek-ok, tri jarojn el kvar,
Sed dudek-naŭ en superjar'.

Mateo McLauchlin tradukis el la angla

INTERNACIA LINGVO

Tio estas kvazaŭ antaŭpriskribo de internacia lingvo fare de Leopardi
(Pensaro, p. 243, septembro 1820)

La universaleco de lingvo devenas, precipe, de la geometria reguleco kaj facileco de ĝia strukturo, de la ekzakteco, objektiva klareco, precizeco, certeco de ĝiaj signifoj, ktp., aĵoj ŝatataj de ĉiuj, ĉar ili baziĝas sur la seka racio, kaj sur la pura komuna sento, sen ajnan rilaton al la beleco, riĉeco (la riĉeco, male, konfuzigas, dificiligas kaj malutilas), digno, diverseco, harmonio, gracieco, forto, evidenteco, kiuj des malpli konvenas aŭ gravas al la universaleco de lingvo, ke 1. ili povas esti intime sentataj, kaj estimataj, nur de samnacianoj, 2. postulas abundon da idiotismoj, figuroj, mallonge, malregulecon, kiuj tiom estas necesaj al la beleco kaj al la plezuro, kiu neniam povas elteni nek la monotonecon nek la skeleton de la matematika ordo, kiom ili nocas la simplan utilon, la facilecon, ktp.

Jacob Hasbun tradukis el la itala

1+2+3-an DE APRILO 2011
69a REGIONA STAĜO
"ESPERANTO FRANCE-EST"
okazigas sian Esperanta Staĝo

de Esperanto apud (nacia strato 415) urbeto Fraize, Colmar, Elzacujo, Nordorienta Francujo, en la Domo Notre Dame des Monts, de la Asocio les Amis du Vic, 88230 Ban Sur Meurthe Clefcy. Programo kun kursoj enkonduka, progresiga, paroliga kaj laŭ-tema. Seminarioj, prelegoj, turismada ekskurspromeno kaj vizitoj al muzeo en St.Dié, al bombonejo en ĉarma vilaĝeto Valtin, al fojro en Plainfaing, al sekojo ĉe lageto en Fraize, al pitoreska valo de Straiture. Planto-kolektado kun helpo de fakulino, sekvata de kuirado kaj gustumado de kolektitaj plantoj kaj interŝanĝo de specifaj receptoj kun helpo de fakaj libroj. Bardhil Selimi, vaste konata albana e-movadisto, verkisto kaj ĵurnalisto, konatigos historion, geografion, lingvon, kulturan kaj nuntempan politikan vivon de Albanujo survoje al Eŭropa Unio. FaMo, lirika baritono de franca koruso Inter-Kant distre koncertos sabate vespere. Prezentado de bildoj pri turismado en Albanujo kaj pri UK en Kubo. Riĉa libroservo kun prezentado de novaj libroj. Knajpo malfermita. Tranoktadoj kaj manĝoj kvalitaj kun malkostaj prezoj kiel kutime.

Retejo http://
esperanto. alsacelorraine. perso. neuf. fr
Simone.cajelot (ĉe) sfr.fr
Gimavo (ĉe) wanadoo.fr

17-an DE APRILO 2011
E-GRUPO « LA KONKORDO »
DE KORTRIJK ORGANIZAS
dimanĉo de la flandraj ardenoj

La tago konsistas el du promenadoj de 9h00 ĝis tagmeze kaj de 14h ĝis 17h. Eblas partopreni nur unu promenadon. Temas pri naturpromenadoj, do vi eble bezonos botojn aŭ minimume fortikajn ŝuojn! Sed ne timu: estas nek ‘fakekskurso’ nek ‘sportkonkurso’. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj. La startopunktoj de la promenadoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne prenu sufiĉe fruan trajnon al Oudenaarde kaj nepre avertu nin! Ni petas kotizon de 3 EUR. Ebla profito iros al la ‘Naturfonduso Flandraj Ardenoj’. Alportu mem vian piknikon. Post aliĝo vi ricevos ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn). Ne prokrastu vian aliĝon! Por aliĝi skribu jenon : nomo ; adreso ; telefonnumero ; totala nombro de personoj kiujn vi aliĝigas ; transportilo uzota por atingi la lokon, ; restado tuttaga aŭ nur antaŭtagmeza aŭ nur posttagmeza ; ĝiru po 3 eŭroj al la konto 000-0428793-53 de ‘La Konkordo’ Kortrijk ; neflandroj rajtas pagi surloke ; dato ; subskribo ; sendu rete aŭ poŝte al:

T. (00 32) (0) 51 62 39 28
piet.glorieux @ gmail.com
Piet Glorieux
Pastoor Blanckestraat 8 poŝtkesto 0201
8610 Kortemark

Paska Dato

Pasko estas kristana festo por soleni la resurekton aŭ reviviĝon de Jesuo Kristo . Reviviĝo estas, laŭ multaj religioj, la postmorta reveno de l' animo aŭ spirito al enkorpa vivo en la sama korpo kie iu vivis. La reviviĝo de Jesuo estus klasika ekzemplo de tiu fenomeno.

Dato de Pasko
2010 - 2020
gregoria kalendaro

Jaro	Okcidente	Ortodokse
2010	4 aprilo	
2011	24 aprilo	
2012	8 aprilo	15 aprilo
2013	31 marto	5 majo
2014	20 aprilo	
2015	5 aprilo	12 aprilo
2016	27 marto	1 majo
2017	16 aprilo	
2018	1 aprilo	8 aprilo
2019	21 aprilo	28 aprilo
2020	12 aprilo	19 aprilo

Pasko okazas je la unua dimanĉo post la unua plena luno de printempo en Jerusalemo, kvankam la dato estas malsama por ortodoksismo kaj por okcidentaj eklezioj. La kalkulado de Pasko instigis la inventon de la kristana erao kaj de la gregoria kalendaro. Paska dimanĉo povas okazi laŭ gregoria kalendaro inter la 22a de Marto kaj la 25a de Aprilo. Laŭ metodo uzata de ortodoksismo ĝi povas okazi inter la 4a de Aprilo kaj la 8a de Majo. La gregoria kalendaro estas suna, sekvas la sunon kaj la sezonojn, tamen la Paska dato estas bazita je la luna kalendaro. Ekzemple Pasko okazas en okcidento plej frue je la 22a de Marto en jaroj 1598, 1693, 1761, 1818, 2285, 2353, 2437, 2505, 2972, 3029. Ĝi okazas plej malfrue je la 25a de Aprilo en jaroj 1943, 2038, 2190, 2258, 2326. Statistike plej malofte ĝi okazas je la 24a de Marto, nur 3 fojoj inter 1583 kaj 2400: 1799, 1940, 2391. Plej ofte ĝi okazas je la 31a Marto kaj je la 16a Aprilo (po 23 fojoj inter 1900 kaj 2400).

Vikipedio

Paska Tradicio

Jen pli frua tradicio de pasko-kalkulado. Laŭ la evangelioj la lasta komunio okazis en la juda festo de pesaĥo, kiun oni kutime festis en la 14-a tago de la juda printempa monato Nisano. La reviviĝo de Kristo okazis en la posta dimanĉo. La judaj lunmonatoj kaj la semajnaj tagoj ne ripetiĝis ĉiujare en la sama maniero. Sekve ekestis la demando, laŭ kio orientiĝu pasko kiel festo de sufero kaj reviviĝo de Kristo. Laŭ la tiel nomata "orienta"

kutimo (ĉefe en la t.n. Malgrand-Azio) oni festis la lastan komunion en la 14-a tago de la juda monato Nisano kaj paskon tri tagojn poste, sendepende de la semajnaj tagoj. La t.n. "okcidenta" kutimo (en la ceteraj komunumoj, interalie en Aleksandrio, Palestino kaj en Romo) signifis festi la reviviĝon en dimanĉo kaj la suferadon en la antaŭa vendredo, sendepende en kiu dato tio estis laŭ la juda Nisano.

En la Koncilio de Niceo en jaro 325 oni interkonsentis akcepti la "okcidentan" kutimon kaj ekde tiam oni kalkulis la paskajn datojn en Aleksandrio.

Intertempe kalkulproblemoj alvenis kiel kialo por reformo. La aprobo de la julia kalendaro siatempe estis grava antaŭenpaŝo, sed ĝi ankaŭ havis malgrandan malprecizecon: suna jaro kompare al meza julia jaro estis mallonga je 11 minutoj kaj 14 sekundoj. Dum jaroj tiu ĉi diferenco fariĝis tagoegala kaj kaŭzis malprecizecojn. En la fino de 14-a jarcento la diferenco pligrandiĝis tiugrade, ke la printempa tag-nokta egaleco anstataŭ al la 21-a de marto trafis al la 11-a de marto. Do Pasko, printempa festo, iufoje okazis en la vintro! Papo Gregorio la 13-a decidis korekti la eraron. Li invitis specialan komisionon, kaj la tagokalkulo antaŭeniĝis je 10 tagoj. Por ke en estonto similaj eraroj ne okazu, oni decidis en ĉiuj kvarcent jaroj forĵeti tri tagojn, sekve la nombro de superjaroj ene de 400 jaroj reduktiĝis je 3 kompare kun la julia kalendaro. Tio estis la solvo de Aloysius Lilius en 1580. La fakta bazo estis la kalkulo de Koperniko pri la longeco de la jaro. En 1530 Koperniko esploris la kalkuladojn de Ptolemeo en 139 kaj al-Battani en 882 kaj kalkulis la jaron por si mem; li atingis la nombron 365,2425, kiu fariĝis la longeco de la jaro en la gregoria kalendaro. Ĉi tiu nova kalendaro nomiĝis gregoria, aŭ jarkalkulo laŭ nova stilo, kaj la julia kalendaro estis nomita jarkalkulo laŭ malnova stilo. En 1582, kiam la gregoria kalendaro estis enkondukita, la diferenco inter la du stiloj estis 10 tagoj, en 1900 ĝi atingis 13 tagojn. En venontaj jaroj ĝi pligrandiĝos plu. En 1582, laŭ la papo, la tago post ĵaŭdo, la 4-a de oktobro (la fina tago de la julia kalendaro), estis vendredo, la 15-a de oktobro (la unua tago de la nova gregoria kalendaro). Sekve de tio en la posta jaro 1583 la unua ekvinokso okazis en la 21-a de marto, kiel intencite. Tio restarigis la situacion en la tempo de la koncilio de Niceo (325 p. K.). Oni elektis la monaton oktobro, ĉar tiu monato havis relative malmultajn tagojn de sanktuloj; sekve la forigitaj tagoj nur malmulte ĝenis la kalendaron de sanktuloj. Ĝenerale, katolikaj landoj plejparte aprobis la kalendaron inter 1582–90, protestantaj landoj inter 1700–53 kaj aliaj landoj inter 1911–28.

Vikipedio

SEMAJNO

Semajno, en multaj kulturoj, estas tempoperiodo konsistante el pluraj tagoj, sed pli mallonga ol monato.

Tri tagoj de la semajno en diversaj idiomoj:

esperanto	dimanĉo	lundo	sabato
afrikansa	Sondag	Maandag	Saterdag
albana	e diel	e hënë	e shtunë
angla	Sunday	Monday	Saturday
araba	الأحد	الاثنين	السبت
armena	Շաբաթ	Երկուշաբթի	Ուրբաթ
	(kiraki)	*(jerkušapti)*	*(šabat)*
belorusa	нядзеля	панядзелак	сыбота
	(njadzjelja)	*(panjadzjelak)*	*(subota)*
bahá'í	Jamál	Kamál	Jalál
bosna	nedjelja	ponedeljak	subota
bretona	Disul	Dilun	Disadorn
bulgara	неделя	понеделник	събота
	(nedelja)	*(ponedelnik)*	*(sabota)*
ĉeĥa	neděle	pondělí	sobota
ĉina	星期日	星期一	星期六
dana	søndag	mandag	lørdag
estona	pühapäev	esmaspäev	laupäev
eŭska	igandea	astelehena	larunbata
finna	sunnuntai	maanantai	lauantai
franca	dimanche	lundi	samedi
frisa	Snein	Moandei	Sneon
germana	Sonntag	Montag	Samstag
greka	Κυριακή	Δευτέρα	Σάββατο
hebrea	יום ראשון	יום שני	שבת
	(jom rišon)	*(jom šeni)*	*(jom šabat)*
hispana	domingo	lunes	sábado
hungara	vasárnap	hétfő	szombat
indonezia	Minggu	Senin	Sabtu
irlanda gaela	Dé Domhnaigh	Dé Luan	Dé Sathairn
islanda	sunnudagur	mánudagur	laugardagur
itala	domenica	lunedì	sabato
japana	日曜日	月曜日	土曜日
	(nichi-jōbi)	*(getsu-jōbi)*	*(do-jōbi)*
jida	זונטיק	מאָנטיק	שבת
	(zuntik)	*(montik)*	*(šabes)*
kataluna	diumenge	dilluns	dissabte
kimra	dydd Sul	dydd Llun	dydd Sadwrn
korea	일요일	월요일	토요일
kornvala	De Sul	De Lun	De Sadorn
kroata	nedjelja	ponedjeljak	subota
latina	Solis dies	Lunae dies	Saturni dies
latva	svētdiena	pirmdiena	sestdiena
litova	Sekmadienis	Pirmadienis	Šeštadienis
manksa	Jedoonee	Jelhune	Jesarn
maorea	Mfumōvili	Mfumoraru	Mfumotsi
nederlanda	zondag	maandag	zaterdag
norvega	søndag	mandag	lørdag
pola	niedziela	poniedziałek	sobota
portugala	domingo	segunda-feira	sábado
romanĉa	dumengia	gliendischdis	sonda
rumana	duminică	luni	sîmbătă
rusa	воскресенье	понедельник	суббота
	(voskresen'je)	*(ponedel'nik)*	*(subbota)*
serba	Недеља	Понедељак	Субота
skotgaela	Di-Domhnaich	Di-Luain	Di-Sathurna
slovaka	nedeľa	pondelok	sobota
slovena	Nedelja	Ponedeljek	Sobota
svahila	Jumapili	Jumatatu	Jumamosi
sveda	söndag	måndag	lördag
tagaloga	Linggó	Lunes	Sabado
taja	วันอาทิตย์	วันจันทร์	วันเสาร์
	ŭan a-tit	*ŭan ĉan*	*ŭan sao*
turka	Pazar	Pazartesi	Cumartesi
ukraina	неділя	понеділок	субота
	(nedilja)	*(ponedilok)*	*(subota)*
vjetnama	chủ nhật	thứ hai	thứ bảy

La semajno ofte markis intervalon inter merkattagoj aŭ religiaj observoj kiel la ŝabato. Nun en la plej multaj landoj oni uzas semajnon de sep tagoj. Diversaj

kulturoj havis diversajn longecojn de semajno, inter kelkaj afrikaj kulturoj kies semajno estas kvar tagojn longa, ĝis la praromianoj, kiuj mezuris la *nundinae*, naŭ tagoj inkluzive (ok tagoj en la semajno) inter unu merkattago kaj la sekva, kaj la praegiptanoj, kies semajno havis dek tagojn. Revolucia Francio dividis la monatojn de sia kalendaro en tri *décades* de dek tagoj. Antikva Ateno ankaŭ havis semajnon de dek tagoj. La semajno en Okcident-Eŭrazio estas de sep tagoj, kiu verŝajne venas el la observo, ke ĉiu fazo de la luno estas proksimume sep tagojn longa. En la gregoria, islama kaj hebrea kalendaroj la semajno havas sep tagojn. Pro la internacia influo de la Okcidenta kulturo, ĝia gregoria kalendaro multe disvastiĝis, tiel ke nun la sep-taga semajno estas uzata en la plej multaj landoj. En Ĉinio (kaj de tie en aliaj orient-aziaj landoj) ekuziĝis la sep-taga semajno en la 16-a jarcento per instigo de jezuitoj. La tagoj de la semajno en la gregoria kalendaro estas: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, kaj dimanĉo. Tiuj nomoj, kun kelkaj ŝanĝoj, venis el la antikvaj latinaj nomoj por la tagoj, nomitaj laŭ la sep astroj, kiuj oniakrede ĉirkaŭiris la Teron kiel diaĵoj: Luno, Marso, Merkuro, Jupitero, Venuso, Saturno, kaj Suno - ĉi du lastaj renomiĝis laŭ la juda kaj kristana ŝabatoj sed konservis siajn nomojn ekzemple en la angla kaj germana. En la portugala kaj en la greka semajntagoj ne havas nomojn, krom sabato kaj dimanĉo - ili estas simple la dua, tria, kvara, kvina kaj sesa semajntago. Tiel ankaŭ en la litova kun "unua tago" lunde ĝis "sepa tago" dimanĉe. Tiamaniere ekzemple lundo estas la unua tago por la litovoj kaj la dua tago por la portugaloj aŭ brazilanoj. La esperantaj nomoj de la semajntagoj venas rekte (kun la escepto de la supre menciita sabato) el la franca : *lundi, mardi, mercredi, jeudi, vendredi, samedi, dimanĉe*. Laŭ internacia normo ISO 8601 la unua tago de la semajno estas lundo. Kelkaj kristanaj landoj, precipe Usono, tamen insistas, ke la unua tago de la semajno estas dimanĉo. Tio kondukas kvarfoje en 28 jaroj al malsama numerado de la semajnoj en jaro. En Portugallingvaj landoj, ĉar semajntagoj ne havas nomojn, ne eblas ŝanĝi tion, ĉar oni ne povas diri "la unua tago de semajno estas la dua tago (lundo)".

KRISTANA ERAO

Pri koncepto de Erao, en geologio, erao estas geokronologia unuo, ampleksanta plurajn periodojn, responda al la kronostratigrafia unuo eratemo : paleozoiko, mezozoiko kaj kenozoiko estas eraoj. En kalendaraj sistemoj kalkulo de la jaroj okazas de la gravaj historiaj kaj legendaj eventoj, kiun oni konsideras komenco de konvena Erao.

La Kristana Erao komenciĝas kun la naskiĝo de Jesuo Kristo, laŭ la kalkulo de Dionysius Exiguus. Ĝi estas la erao de la gregoria kalendaro kaj, depost 527, de la julia kalendaro.

Estas konataj sekvantaj kalendaraj eraoj:

Tempo kalkulo	Evento, baziĝo de la kalendara erao	Eko de kalkulo
Bizanca kaj ortodoksa	Mita kreo de la Universo	01.09. 5509 a.K.
Astronomia	Komenco de Julia periodo	01.01. 4713 a.K.
Hebrea	Kreo de Adamo	07.10. 3761 a.K.
Malnov-greka	Unuaj Olimpiaj ludoj	01.07. 776 a.K.
Romia	Fondiĝo de Romo	21.04. 753 a.K.
Seleŭkia	Komenco de la imperio	aŭtuno 312 a.K.
Kristana	Naskiĝo de Jesuo Kristo	01.01. 0001 p.K.
Islama	Fuĝo de Mohamedo de Meko (Heĝiro)	16.07. 622 p.K.
Franca Respublika	Deklaro de la Franca Respubliko	22.09. 1792 p.K.

Dionysius inventis la eraon en la 6-a jarcento por faciligi la kalkuladon de la dato de Pasko. Ĝi estis popularigita en la 8-a jarcento en la historio de anglosaksa sanktulo, monaĥo kaj verkisto Bede. La mallongigo estas a.K (antaŭ Kristo) kaj p.K. (post Kristo). La jaro antaŭ 1 p.K. estas 1 a.K., ĉar la numero de jaro estas orda numero, do ne estas jaro 0.
Antaŭ la tempo de Bede estis diversaj sistemoj por doni la datojn de jaroj. Li estis inter la unuaj uzantoj de la sistemo en kiu la dato estas la nombro de jaroj post aŭ antaŭ la supozata naskiĝjaro de Jesuo Kristo, kaj liaj verkoj tiom popularigis tiun sistemon ke ene de unu jarcento ĝi kutimis.

Vikipedio

ESPERANTO KAJ VERDE!

Landa hungaria nutraĵvendeja ĉeno Spar anoncis konkurson, en kiu oni povis gajni diversajn premiojn, sendante etikedojn de mineralakvaj boteloj nomata "Verde".

Faris tion ankaŭ s-ano Ódor György (malnova esperantisto en la urbo Zalaegerszeg), kaj pere de bona fortuno li gajnis la ĉefpremion, aŭtomobilon Fiat Punto. Dum la ricevo de la premio, kaj dum la fotado li portis nigran T-ĉemizon kun okulfrapa surskribo "Esperanto", do tiu vorto nun aperas en bone legebla formo sur etikedoj de multcentmiloj da mineralakvaj boteloj "Verde". Gratulojn al s-ano Ódor György kaj lia edzino, ni deziras agrablajn vojaĝojn per la nova aŭtomobilo, kaj ni dankas lin pro vestado de Esperanta-T-ĉemizo. Jen tiel oni povas disvastigi Esperanton!
Fotogalerioj videbligas fotojn:
Pri gajnintoj, boteloj kaj etikedoj:
http://kep.tar.hu/eszperanto/
menuero "2010 Verde, Verda".
Pri konkurso, lotumado, transdono:
http://www.veddesnyerd.eu
menuero "Galeria 2010".

Cheb Ji, china.org.cn/esperanto/ (el Eventoj)

SENPERFORTO

Eŭropa esplorprojekto referencas al Esperanto. En la Senperforto-projekto 14 partneroj en 8 Eŭropaj landoj (*Portugalujo, Grekujo, Nederlando, Irlando, Hispanujo, Hungarujo, Belgujo kaj Malto*) kunigas iliajn fortojn por malpliigi perforton rilatan al sekso kaj seksa rolo en eŭropaj akcepto- kaj azilocentroj. La projekto celas krei klaran referencokadron por ĝia preventado ricevas la subtenon de la Eŭropa Komisiono. Kunordigas ĝin sinjorinoj Ines Keygnaert kaj prof. Marleen Temmerman de la ICRH - "*International Centre for Reproductive Health*" de la universitato UGent en Belgujo. La invitilo al la eŭropa seminario je la 10a decembro 2010 en Bruselo enhavis referencon al *Esperanto* nome ke "Senperforto" estas Esperanto kun klarigo en la angla, nederlanda kaj franca.

Informas retadreso: ines.keygnaert @ ugent.be
Herman Deceŭninck, 2-2-2001
Dumviva membro de EBG
Talenfestival Leuven, Zaterdag 19/2/2011
www. talenfestival.be

FENG ŜUI

Feng Ŝui balancigas energion. Vi bone aranĝas vian dominternon, tiel ke ĉio harmonias kaj energio povas libere flui. Sed aperas en ĉambro sinokomputilo, elektraj dratoj, muso, eksternaj laŭtparoliloj kaj via bone organizita energio konfuziĝas. Feng Ŝui estas multjarcenta ĉina sistemo por ekvilibrigi kaj gardi la energion en ia domo. Laŭ la principoj de Feng Ŝui la farbo kaj la loko de la objektoj en iu ĉambro determinas la sukceson de la loĝantoj sur la profesia tereno. Komplekseco egalas al konfuzo. Tial tenu kiel eble plej simplan la kolekton da objektoj, farboj kaj tehnologio kaj elektu naturan aranĝon. Tiel vi evitas konfuzon de la pozitiva energio aŭ '*ĉi*'.

Suprendirektitaj lumigiloj en la anguloj de ĉambro aŭ en niĉo ekmovas la malrapidan energion, kaj negativeco malaperas. Hela lumo en la ĉirkaŭaĵo de la komputilo stimulas la moviĝon de energio ĉirkaŭ la laborloko kaj tenas la energion movanta. Tio ankaŭ stimulas kreemon, pozitivan pensadon kaj la disvolviĝon de novaj ideoj. Rondajn, metalajn objektojn kiel bovlojn kaj vazojn oni metas prefere okcidenten, nordokcidenten kaj norden. Tiam stagnita energio transformiĝas en pozitivan '*ĉi*', kiu moviĝas egale tra la ĉambro. La bovloj kaj vazoj devas tamen esti malplenaj, kvazaŭ ili atendas eblaĵojn, kiuj povas plenigi ilin. Tenu vian laborspacon kiel eble plej orda kaj evitu amasiĝon de fatraso. Verdo kun flavo estas kreskokoloroj, kiuj simbolas plantojn kaj sunbrilon. Ĉiam uzu ilin en la sudo kaj la sudoriento. Tiuj koloroj de la leviĝanta suno plifortigas la naturan energion en ia spaco kaj ĉe la homoj, kiuj troviĝas tie. Ruĝo kun flavo estas fajraj koloroj, kiujn oni aplikas precipe en la sudo. Tiam ili altiras pozitivan energion, entuziasmon kaj novajn ideojn. Metu plantojn en la orienton, la sud-orienton, la nordon aŭ la sudon de ĉambro. Ilia natura agado egale distribuas la energion.

Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel
pieter-jan.doumen@telenet.be - *La Ponto N°15*

BICIKLADOTERMINOJ

EU-leksikono de bicikladoterminoj aperis en Belgujo. Temas pri la dua eldono de ilustrita pasportformata libreto enhavanta ŝlosilterminojn rilate al biciklado, biciklospecoj kaj biciklokonstruo en 27 lingvoj, inkluzive de ĉiuj 23 oficialaj eŭrop-uniaj lingvoj, statistikoj pri biciklado en Eŭropo, samkiel aspektojn ekonomiajn, sanrilatajn kaj mediprotektajn de biciklado.

La dua eldono aperis okaze de la internacia konferenco pri biciklopolitiko "Velo-city Global 2010". La eŭropa bicikla leksikono estas utila por ĉiuj, kiuj deziras bicikli en alia eŭropa lando. Ĝi kreskigas konscion pri la multaj avantaĝoj de biciklado kaj la bezono je bona bicikla infrastrukturo inter la civitanoj kaj inter la diversaj publikaj instancoj. Ĉu vi estas sperta pri tradukado kaj ĉu vi emas kunlabori por eldoni esperantlingvan version? Ekde aŭtuno 2010 prezentiĝis al la esperantistoj la ebleco aldoni terminojn kaj traduki jam ekzistantajn terminojn tiucele partoprenante en kreotan Viki-kunlaborejon. Jam nun ekzistas presita versio en aliaj kromaj lingvoj (rusa, japana, ĉina, araba), kiuj do ne estas inter la 23 oficialaj EU-lingvoj, kaj en interreta versio ankaŭ jenaj lingvoj estas en fazo de preparo: kroata, turka, islanda, makedona, montenegra, albana.

Kunlaboro estas bonvena! Por pliaj informoj: Eŭropa Ekonomia kaj So-cia Komitato. Konsultu ĝian retejon :
http://www.eesc.europa.eu
/?i=portal.en.home#boxTabl-3
aŭ demandu pliajn deta-lojn al :
Barbara.Gessler@eesc.europa.eu

Herman Deceuninck, dumviva membro de EBG en La Ponto n°16, revuo de Pieter Jan Doumen

BULLER KUN SANAJ ZORGOJ

En la nomo de la Estraro de Universala Esperanto Asocio mi havas la taskon informi vin, ke pasintsemajne la Ĝenerala Direktoro, Osmo Buller, estis enhospitaligita en Roterdamo pro gravaj sanproblemoj.

Barbara Pietrzak,Ĝenerala Sekretario de UEA

Temas pri subita spirproblemo kiu pasis, provizore, kaj oni ne trovis evidentan kaŭzon, sed Osmo devas tamen resti kelkajn tagojn en la hospitalo por observado. Mark Fettes

De kiam interkonatiĝis du junuloj, unu el norda, alia el sudokcidenta Finnlando, en agado por socia justo kaj humaneco, kiu ampleksis ankaŭ la Zamenhofan idealon, ili neniam flankenlasis siajn idealojn, kaj unu el ili neniam lasis al si ripozon en tiu laboro; li ĉiam vivis por aliaj homoj kaj homaj idealoj. Mi petas peri al li mian plejan bondeziron por rekonkero de fortoj. Tuomo Grundström, 16-2-2011

NIA PLANEDA VARMIGECO

La plej varma monato en historio de la planedo Tero estis Junio 2010. Ek de kiam oni mezuras temperaturojn en la mondo, neniam antaŭe oni registris tiel varman monaton, laŭ Usona Oceana kaj Atmosfera Agentejo (NOAA angle). La periodo de aprilo al junio 2010 ankaŭ rompas rekordon. Sur la Tero estas pli kaj pli varma vetero. Laŭ la donitaĵoj de NOAA, kiu komenciĝis en 1880, ni havis 16,2°C de mezuma temperaturo en la 20a jarcento, tio

estas 0,68 ° super la ordinara temperaturo de la 19a jarcento (proksimume 15,5°C). Tio ja ŝajnas esti malgranda cifero, sed sur la skalo de la terglobo, tia diferenco estas konsiderinda.

En iuj lokoj, la mezuma temperaturo efektive superis de 4° aŭ eĉ 5° la normalan temperaturon. Estas tia kazo en la centro kaj oriento de Usono, en Peruo, en la orienta kaj okcidenta partoj de Rusujo, en Mongolujo, en la nordoriento de Ĉinujo, aŭ en Groenlando, laŭ karto eldonita de NOAA. Nur Skandinavujo, la sudo de Ĉinujo, la nordokcidento de Usono, kaj Hispanujo (kiu havis rekordajn minimumojn ekde 1997) ne estas trafitaj de tiu trovarmiĝo. Ĉi tiuj zonoj eĉ registris malgrandan falon de temperaturoj. La oceanoj ankaŭ fartas iomete pli bone, ĉar la monato junio 2010 nur estas la kvara plej varma konata (16,4°C ordinare, tio estas 0,54 ° super la normala temperaturo de la 20a jarcento). La temperaturpliiĝo sur la kontinentoj, kompare kun tiu de la pasinta jarcento atingas 1,07°. La periodo aprilo-junio de 2010 estas la plej varma iam registrita, kaj la periodo januaro-junio, la dua plej varma tuj post 2007. Pli maltrankvilige la fenomeno ŝajne plu daŭros. El interreto

PLANEDOJ GIGANTAJ

Planedoj gigantaj turniĝas mise. La malkovro de mise turniĝantaj gigantaj planedoj ekster nia sunsistemo dubigas nunan teorion pri la estiĝo de la planedoj.

La planedaro fariĝas ĉiam pli ekzota. Antaŭ malpli ol 20 jaroj oni ankoraŭ plenkore ridis pri la sugesto, ke eble ekzistas planedoj ekster nia sunsistemo. Ekde la malkovro de la unua ekstera planedo en oktobro 1995 ekis vera ĉasado de planedoj. Post la freŝdata malkovro de naŭ novaj planedoj, la nombro de eksteraj planedoj sumas je 452! De gasgigantoj de la kalibro de Jupitero ĝis planedoj iomete pli grandaj ol nia tero. Oni dubas ĉiam malpli pri la ebleco de vivo sur tersimilaj planedoj. Nemalmultaj el tiuj gigantaj planedoj kondutas ege strange, kiel aperas el esploro de la Eŭropa Suda Observatorio ESO. El sonda provo de 27 gigantaj planedoj, inter kiuj naŭ novaj, aperis, ke ses el ili turniĝas ĉirkaŭ sia patrinstelo kontraŭ la normala direkto. Ĝis nun oni akceptis, ke planedoj turniĝas en la sama direkto kiel la rotacia akso de sia stelo. Plue evidentiĝis, ke la orbito de kelkaj aliaj planedoj estas oblikva kaj senorda. Tio signifus, ke tiuj gigantaj planedoj ne ekestis, kiel oni ĝis nun ĝenerale pensis, el giganta disko de polvo kaj gaso ĉirkaŭ juna stelo, sed ke dum periodo de centoj da milionoj da jaroj ili estus altiritaj de sia patrinstelo el malproksimegaj limregionoj. Antaŭ ol instali sin sur la strangan orbiton ĉirkaŭ sia suno, ili estus detruintaj malgrandajn tersimilajn planedojn aŭ katapultintaj ilin en la spacon.

Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel (Het Nieuwsblad) pieter-jan.doumen @ telenet.be-La Ponto N°15

MALDIKIGU VORTAROJN!

Kiam mi komencis la kompiladon de Granda Vortaro Esp-Korea en 1988, mi skribis al la ĝenerala sekretario de SAT por akiri la permeson traduki la PIV-on en korean lingvon kune kun erartabelo de ĝi. La Sekretario volonte permesis, kaj eĉ dankis min pro la rimarkoj de multaj eraroj en PIV.

Tiam mi proponis al li pli detale difini la vorton rizo, ĉar en PIV ĝi havas tre ampleksajn signifojn: 1. rizujo, rizoherbo; 2. rizero, rizgrajno; 3. rizaĵo kuirita kaj manĝebla. La sekretario respondis al mi, ke simila problemo estas ankaŭ en la nordaj landoj, kie troviĝas 40 specoj da neĝoj. Se oni registros en PIV tiel diversajn rizojn, neĝojn, kaj aliajn aferojn de ĉiuj landoj de la mondo, PIV baldaŭ dikiĝos kiel la vortaroj Webster aŭ Oxford.

Sed, kio okazis en nova PIV, 14 jarojn post lia negativa respondo! Tre afable oni aperigis novajn vortojn de koreaj manĝaĵoj kaj drinkaĵo, kiaj kimĉio, gomtango, kaj makolio. Krom tiuj vortoj, la nombro de la vortoj en nova PIV pli grandiĝis je ĉ. 1,500 ol la antaŭa PIV, kaj entute ĝi jam havas 18-oble plimultajn vortojn, ol tiuj en la Unua Libro de Zamenhof.

Kuracistoj diras, ke la dikiĝo de korpo estas malamiko de sano kaj fonto de malsanoj. Tiu ĉi ideo igis min ekpensi, ĉu la esperantaj vortaroj jam fariĝis tro dikaj por teni sin sana aŭ ne. Kaj mi alvenis al la konkludo, ke venis la tempo maldikigi la esp-vortarojn.

Verkante kelkajn vortarojn en lastaj 20 jaroj, mi ĉiam cerbumis pri jenaj demandoj: - ĉu ni ja bezonas tiel dikajn vortarojn?

Aŭtoro Ma Youg-tae dum junaĝo

- ĉu estas bone, ke ni alprenas la neologismojn tiel senbride kiel ĝis nun?
- do, ĉu ne troviĝas la rimedo por solvi la problemon?

Jen mi prezentas al vi ĝis-nunan situacion pri la kreskado de la nombro de esperantaj vortoj laŭ la eldon-jaroj de vortaroj.

- Vortaroj / Eldon-jaro / Nombro de vortoj
- Unua Libro de LLZ / 1887 / 900
- Universala V. de LLZ / 1894 / 2,640 (ĉ. 5,000 post 9OA)
- Plena V. de Boirac / 1909 / 10,000
- Plena Ilustrita V. de Gaston Waringhien / 1970 / 15,200 kapvortoj (39,400 leksikaj unuoj)
- Nova Plena Ilustrita V. de M. Duc-Goninaz / 2002 / 16,780 kapvortoj (46,890 leksikaj unuoj)

Ĝenerale, esperantaj vortaroj dikiĝas pro la aldonoj de neologismoj, fakaj terminoj, kaj eĉ propraj nomoj de homoj, landoj, urboj, montoj kaj riveroj ktp. Do, nuntempaj vortaroj de Esperanto fariĝis similaj al "Enciklopedioj".

Estas tute nature, ke la vortoj multiĝas jaron post jaro laŭ la progreso de scienco kaj tekniko. Sed se ni atente observas, ni trovas la vortojn, kiujn ni povas anstataŭigi per vortfarado. Ni memoru, ke d-ro Zamenhof faris

Esperanton facila! Sed male, ni faras ĝin malfacila, dirante, ke tio estas ne evitebla.

Dum lastaj kelkaj jaroj, mi cerbumis pri ĉitiu problemo, kaj lastjare trovis unu okulfrapan artikolon en tagĵurnalo de mia lando.

La artikolo temis pri Globish. Globish estas mallongigo de Global English, kaj la iniciatinto nomis ĝin "la nova internacia lingvo". Sed efektive ĝi estas nenio krom "simpligita angla lingvo". Komence mi forridis, kaj pensis, ke ĝi estas unu el la malsukcesintaj kelkcent provoj de planlingvoj. Sed ĝi vekis en mi grandan scivolemon, kaj mi atente esploris kaj komparis ĝin kun Esperanto. Jen la tabelo por kompari Esperanton kaj Globish.

Esperanto	*Globish*
nombro de vortoj	
ĉ. 5,000(ĝis 9OA)/ aŭ: 16,000 (Nova PIV)	1,500
gramatiko	
regula kaj facila	simpligita kaj pli facila ol la angla
uzebla	
inter membroj	ĉie, kie angla lingvo estas parolata (t.e. en 75 landoj, kie la angla estas oficiala lingvo aŭ rigardata kiel ĉefa lingvo)
disertacio	
nur kalkulebla	75% el la ĉiuj disertacioj publikigitaj en la mondo
en internacia komercado, aviada kampo, sporta mondo	
malofte uzata	uzata kiel komuna lingvo
en flughavenoj, hoteloj, stratoj, ĉiovendejoj	
neuzata	uzata en preskaŭ ĉiuj landoj
neŭtralecon	
havas	ne havas
agnoskita	
de UNESCO	
de VOA (Voice of America en la nomo de "Special English Program")	
konateco	
malalta	
alta	

° 9OA: 9a oficiala aldono de AdE.

Se homoj celas nur praktikeblecon de la lingvo kaj la neŭtraleco ne gravas al ili, multaj el ili elektos la novan lingvon Globish.

Eĉ se ni pensas, ke Globish ne povos minaci Esperanton, ĝi estos certe ĉarma lingvo al homoj, ĉar homoj, ĉu aziaj, ĉu eŭropaj, jam havas iu-nivelan scion pri angla lingvo. Kion do ni faru? Jen mi diras al vi "Ni revenu al Zamenhofismo!" por teni la lingvon facila kaj la vortaron maldika, kiel Esperanto naskiĝis antaŭ 120 jaroj.

Por realigi tion ni povas konsideri jenajn aferojn:

1. Ne uzu arbitre nelogismojn. Aŭ, strikte limigu la uzadon de la neologismoj. Alie, niaj vortaroj fariĝos tiel dikaj kiel nacilingvaj vortaroj en proksima estonteco!
2. Uzu simplan formon de vortoj.
3. Uzu simpl-forman gramatikon tiel, kiel d-ro Zamenhof faris.
4. Anstataŭigu malfacilajn terminojn per la facilaj vortoj.
5. Ni faru vortaron maldika, kiu ne timigas komencantojn kaj neesperantistojn, kaj aparte faru la vortarojn por neologismoj kaj fakaj terminoj.

1. Ne uzu arbitre nelogismojn:

La unuaj vortoj estas anstataŭigeblaj kaj anstataŭigendaj per la duaj, kiujn ni jam konas:

basa/ malalta
dura / malmola
febla/ malforta
frida/ malvarma

humida/ malseka
kurta/ mallonga
lanta/ malrapida
magra / malgrasa
noci/ malutili
obskura / malluma
olda/ maljuna
pigra / mallaborema
plumpa/ malgracia
povra / malriča

Homoj, kiuj preferas neologismojn, diras, ke neologismoj estas pli elvokivaj ol vortoj kun la prefikso mal-, ĉar la neologismoj devenis de siaj propraj lingvoj. Sed al unulingvanoj, kiuj havas nenian rilaton kun la neologismoj, la neologismoj povas ŝajni kiel sanskritoj aŭ bantuaj lingvoj.

Zamenhof elpensis la regulojn de vortfarado por krei novajn vortojn per finaĵoj, afiksoj, kunmetado kaj vortgrupigo. Dank' al tio, li povis okulfrape maldikigi la vortaron. Sed, se ni senfine uzos kaj alprenos neologismojn kun la kialo, ke la 'mal'-vortoj estas malpli elvokivaj ol neologismoj, esperantaj vortaroj dikiĝos senfine. Kaj tio estos kontraŭ Zamenhofismo!

Mi petas vin kontroli, ĉu jena poemo de Antoni Grabowski estas ne elvokiva pro la 'mal'-vortoj:

La pluva tago

La tago malvarma, malgaja, sensuna;
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Vinujo je l'muro putranta sin tenas,
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,
Kaj la tago — malvarma, sensuna.
Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna,
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,
Sed falas en vento esperoj velkintaj,
Kaj la tagoj — malvarmaj, sensunaj.
Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!
Post nuboj la suno radias — atendu!
Ne sola vi tiel kun sorto batalas,
En vivo de ĉiu la pluvo ja falas,
Kelkaj tagoj — malvarmaj, sensunaj.

Ni povas kompreni la poemon kun plena elvokiteco, ne malhelpate de 'mal'-vortoj, kaj ricevis la senton de la tagoj nubaj kaj pluvaj en nordaj landoj.

Iuj diras, ke rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj:

1. la simpleco kaj facileco.
2. la riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo.

La kolizio ne ŝajnas repacigebla, ĉar ni ne povas rezigni la avantaĝojn pri la facileco kaj simpleco por propagando de Esperanto, nek pri la esprimforto kaj vortriĉo por literaturo. La problemo ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la „poeziaj vortoj“, t.e. vortoj uzataj nur en la alta literaturo. Ĉi tiujn vortojn, almenaŭprovizore oni devus klarigi fine de ĉiu libro, en listo.

Jen mi havas unu ekzemplon por solvi la problemon de neologismoj:

Inslanda lingvo estas unu el la bonaj ekzemploj rilate al la enkonduko de novaj vortoj. En la 19-a jarcento, leviĝis en Islando la movado de lingva purismo, kiu sukcese batalis kontraŭ danaj pruntvortoj en la lingvo. Post sendependiĝo frue en la 20-a jarcento tiu purisma movado pludaŭris kiel reganta sinteno de islandanoj al sia lingvo.

1. Ili faras novajn vortojn en facila formo, por ke homoj povu kompreni ilin sen konsulto de vortaro.
2. Ili faras novan kunmetaĵon per jam konataj vortoj.

Jen bona ekzemplo. La islanda vorto por telefono estas smi. Ĝi estas prenita el la poezia lingvo de la antikva Edda-poezio, kie ĝi signifas fadenon el oro. Eble islandanoj pensus, ke telefono estas tiel kara kaj grava, kiel la fadeno de oro.

2. Uzu simplan formon de vortoj:

Jenaj vortoj estas tiuj, kiuj estas malsimpligitaj kaj erare uzataj per aldono de nenecesaj afiksoj en Koreio:

vestaĵo → vesto (ĉitiuj havas malsamajn signifojn, sed oni emas uzi 'vestaĵon' por 'vesto').
- vesto estas ĉio, kion oni portas sur si.
- vestaĵo estas ĉiu el la pecoj de vesto.

longeco → longo (longeco havas alian signifon)
- longo: la ponto havas 2 kilometrojn da longo.
- longeco: la longeco (ne malfacileco) de la laboro lacigis lin.

Krom tuj ĉi ekzemploj ni povas trovi jenajn: alteco → alto / profundeco → profundo / larĝeco → larĝo / tranokti → nokti (☞ birdoj noktas sur arboj) / almozpetulo → almozulo, almozisto ktp. Ne nur ĉitio! Esperanto havas tri malsamajn vortojn por esprimi la ideon de la loko (aŭ: ĉambro), kie oni enfermas krimulojn: malliberejo, karcero, prizono. “Malliberejo” estas sufiĉa!

3. Uzu simpl-forman gramatikon tiel, kiel d-ro Zamenhof faris:

- intus: Kiel la ekzemplon mi citas la frazon el Psalmo: ĉapitro 124: 2, 3

Se la Eternulo ne estus kun ni, Kiam homoj leviĝis kontraŭni: Tiam ili englutus nin vivajn, Kiam ekflamis kontraŭni ilia kolero. Psalmo 124:2, 3.

Zamenhof ne diris “se la Eternulo ne estintus kun ni", sed simple, "se la Eternulo ne estus kun ni." Tio sufiĉas. Same, Zam diris: "glutus nin" anstataŭ "glutintus nin".

4. Anstataŭigu malfacilajn terminojn per la facilaj vortoj:

- gramatikaj vortoj: substantivo → o-vorto / adjektivo → a-vorto / verbo → i-vorto / adverbo → e-vorto

Rilate al tiuĉi temo, mi volas danki kaj laŭdi s-ron Bertilo Wennergren, kiu jam uzis "o-vorton, a-vorton" kaj aliajn en sia verko Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Ĉi tio povas ŝajni bagatela afero, sed estas grandega diferenco inter la "aparta lerno de memstaraj vortoj" kaj "la vort-farado per jam konataj vortoj kaj afiksoj. Eble vi konas la plej longan vorton en Esperanto: Ĝi estas otorinolaringologio. Se ni anstataŭigas ĝin per bazaj Esp-vortoj jam konataj, ni povos fari la vorton facile, kaj memori longe: orel-nazo-gorĝ-ologio

- orelo anstataŭ oto; nazo anstataŭ rino; kaj gorĝo anstataŭ laringo.

Alia ekzemplo: Silvestrumi

Ĉu vi povas kompreni, se mi diras: "Li estas kiel Hong Kil-dong"? Eble ne! Vi neniel povas kompreni sen jena historia fono de Koreio.

Hong Kil-dong estis tre fifama homo, kiu vivis en la 16a jarcento en Koreio. Li estis ĉefo de banditoj, sed poste li fariĝis la simbolo de homo, kiu estas tre kuraĝa, forta kun lertaj batalartoj, kaj li aktivis por teruri kaj puni koruptiĝintajn ŝtat-oficistojn. Se iu eŭropa esp-isto diras: "Kie ni silvestrumu ĉi jare?", tio estas por orientanoj ne komprenebla, same kiel ili ne komprenas pri Hong Kil-dong. Laŭ mia esploro, Silvestro estis papo, kiu mortis la 31an de decembro, kaj

oni festas tiun tagon, kiel lian naskiĝtagon en la Ĉiel-regno. Samtempe oni rigardas tiun tagon kiel la feston por la jarfina tago. Estas nature, ke homoj sen scio pri tiu katolikisma kulturo ne komprenas, kion signifas 'silvestrumi'.
Do, ĉu ne estas pli rekomendinde 'festi la lastan tagon de la jaro', ol 'silvestrumi'? Mi trovis la vorton en revuo Esperanto, la organo de UEA, en decembra numero lastjare.

5. Faru vortaron maldika:

Unue, ni faru Esp-vortarojn maldikajn, kiuj ne timigos komencantojn kaj neesperantistojn. Estas necese, ke ni varbu novajn esperantistojn kun facila gramatiko kaj maldika vortaro, kiel la Globish nun faras.
Due, aparte faru la vortarojn, kiuj enhavas neologismojn, fakajn terminojn, kaj proprajn nomojn de homoj kaj lokoj, por ke la vortaro ne ŝajnu Enciklopedio! Do, laŭbezone, oni elektu la vortarojn por siaj nivelo kaj celo. Komencantoj lernas Esperanton kun granda espero kaj eĉ fantazio, kiuj eventuale realiĝos en sia vivo pere de Esperanto. Sed, se antaŭ ili estas metita dika kaj peza vortaro de Esperanto, ili povas senkuraĝiĝi antaŭ ol komenci la esperantistan vivon. Ni ne seniluziigu la novebakitajn esp-istojn per tro dikaj enciklopediecaj vortaroj, sed donu al ili esperon, ke ili povas mastri Esperanton facile. Ni memoru, kiel faras la inslandanoj rilate al neologismoj, kaj faru Esperanton ne komplika, sed simpla kaj facila, kia ĝi estis komence de la naskiĝo en 1887. Dankon.

MA Young-tae, Koreujo,
membro de Akademio de Esperanto

Ma Youg-tae (nura sidanta viro due dekstre maldekstren) en 15.2.2008 kun redaktoro kaj aliaj esperantistoj koreaj dum 5a Azia Kongreso en urbo Bangaloro, ĉefurbo de ŝtato Karnatako (Barato aŭ Inda Unio).

MA YOUNG-TAE (馬榮泰)

Ankaŭ konata laŭ esperanta nomo Leono, estas korea esperantisto, kiu naskiĝis en 1946 en la provinco Kyongki-do. Longe loĝis en urbo Yong-In, 30 km sude de Seulo. Li loĝis en sia hejmloko, ĝis li lernis en altlernejo, sed li ekloĝis en Seulo, de kiam li eniris en la universitaton Konkuk en 1964. Li fariĝis esperantisto en 1966, kiam li estis en la tria studjaro de la Universitato. Li estis nomumita kiel oficiro en 1968 post la trejnado de ROTC (angle: *Reserve Officers Training Corps*) dum la lastaj du universitataj jaroj. En la jaro 1970 li finis la militservon kaj elarmeiiĝis kiel leŭtenanto de la rezerva armeo. Tuj post la militservo li eklaboris en Korea Esperanto-Asocio kiel ĝenerala sekretario. En 1971 li unuafoje vojaĝis eksterlanden al Jananio por partopreni en la kongreso de japanaj esperantistoj. Tie li gajnis la trian premion en la oratora

konkurso. Li plu studis bibliotekologion en la post-universitata kurso de la univ. Songkyunkwan en Seulo, kaj laboris kiel bibliotekisto en universitatoj Sejong (1976) kaj Dankook (1977-1986). En 1986 li partoprenis en la Pekina UK en Ĉinio kune kun D-ro Chang Choong-sik, tiama prezidanto de la universitato Dankook, kaj en decembro de la sama jaro Esperanto-Instituto en la Univ. Dankook estis fondita, kaj li eklaboris en la Instituto, kaj studante kaj instruante Esperanton al la studentoj kiel docento. En 1984 li iris al Usono por plu studi la bibliotekologion en Simmons College en Bostono. Dum la restado en Bostono li renkontis multajn esperantistojn tie kaj li verdiĝis pli dense. Emeritiĝinte en 2002, li translokiĝis al nuna urbo Yong-In, kaj ekde 2005 li denove fariĝis la docento de Esperanto en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (ĉine: 韓國外國語大學校; angle: Hankook University of Foreign Studies), kaj instruas Esperanton ĝis hodiaŭ. En la jaro 1991 li studis Esperantologion en la universitato ELTE, en Hungario du foje vizitante en unu jaro, ĉar ĝi estis koresponda kurso.
Li verkis diversajn esperantaĵojn: T.e. lernolibroj por la niveloj baza (Unua paŝo al Esperanto), meza (Laŭ-tema konversacio de Esperanto) kaj alta (stilo de Esperanto), kaj vortaroj Esp-Korea kaj Korea-Esperanta, kaj en novembro, 2007, li verkis 'Manlibron de Esperanto (290-paĝa, en korea lingvo)', kaj laste li verkis "English-Esperanto Conversation (Angla-Esperanta Konversacio)" (296-paĝa, Angla-Korea-Esperanta) en aprilo, 2008. En la jaro 2002, li ricevis la premion Deguĉi kune kun Lee Jung-kee. Li faris lekciojn vojaĝante en Ĉinio, Japanio, kaj Tajvano. Precipe li ekspluatis en la jaro 1998 la novan programon por efika instruado de Esperanto: Lando de Esperanto (LE). En LE li ne nur instruas Esperanton, sed ankaŭ igas la kursanojn ĝui la lingvon kun diversaj ludoj, kvizoj kaj kantoj kune kun gitar-ludo, kaj ĝin praktikis en Koreio, Ĉinio, kaj en Friska Lernejo en Japanio. Li partoprenis en UK-oj en Budapeŝto (1983), Vankuvero (1984), Tampereo (1995), Tel-Avivo (2000), Seulo (1994), Pekino (1986), Jokohamo (2007) ktp. Li estas dumviva membro de UEA ekde 2002, kaj en aprilo de 2007, li fariĝis membro de Akademio de Esperanto. Grava kontribuinto al la revizia laboro por la *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. En la 92a UK en Jokohamo (2007), li publikigis sian referaĵon La studo pri la maldikigo (normigo) de esperantaj vortaroj en la esperantologia konferenco. Ekde julio, 2008, li laboras en Nankina Universitato(南京大學) en Ĉinio kiel vizit-profesoro(招聘教授) de Esperanto.

Vikipedio

FOLKKONCERTO

Organizanto EBG (Esperantista Brusela Grupo) www.esperantobruselo.org

KAPRIOL!

AVEC
KUN
MET

GRATUIT
SENPAGA
GRATIS

Respondeca eldonanto, Éditeur responsable,
Verantwoordelijke uitgever : Françoise Pellegrin

Groupe Folk frison (Pays-Bas) qui chante en espéranto* sur des mélodies de danses traditionnelles
Frisa folkgrupo (Nederlando) kiu kantas Esperante laŭ tradiciaj dansmelodioj
Fries folkband (Nederland) die op traditionele dansmelodieën in het Esperanto* zingt

POLKA. MAZURKA. SCOTICH. BOUREE. ANDRO. GIGUE. VALSE. CERCLE...

VENDREDI 15 AVRIL 20 H **VRIJDAG 15 APRIL**

CENTRE CULTUREL DE MAELBEEK
KULTURCENTRO DE MAALBEEK
KULTUREEL CENTRUM VAN MAALBEEK

RUE DU CORNET 97
BRUXELLES

HOORNSTRAAT
BRUSSEL

VENDREDO 15A DE APRILO 2011



* L'espéranto est une langue construite, conçue pour être la plus facile à apprendre et à comprendre, et destinée à servir de langue internationale d'échange entre personnes de langue maternelle différente.

* Esperanto is een kunsttaal ontworpen om het gemakkelijkst te zijn om te leren en te begrijpen, en, om als internationale uitwisselingstaal tussen personen van verschillende moedertalen te dienen.

Afiŝo de Samy Loisse kaj lia teamo de EBG, versio 11_a .

SIMON TITE



Fotajoj de la redaktoro dum kunvenoj EBG de la 10a kaj la 16a de Septembro 2008

Eksa aktiva kunaganto kaj ano de EBG retranslokiĝis al Manĉestero en Anglujo